

[วารสาร-bulteno](#) >

122018

Ĉiumonata reta bulteno de Bangkoka Esperanto-Klubo
วารสารออนไลน์ชมรมภาษาเอสเปรันโตกรุงเทพ

Verda Elefanto

=====

N-ro 5 decembro 2018

ฉบับที่ 5 เดือนธันวาคม 2561

=====

Saluton, karaj legantoj de la kvina numero de Verda Elefanto, la **simpła reta bulteno** de Bangkoka Esperanto-Klubo! En tiu ĉi numero ni prezentos al vi fotojn de Bangkoka Zamenhof-Festo. Ni esperas, ke vi povas trovi ion interesan en nia **simpła reta bulteno**. - Verda Elefanto.

=====

Novaĵoj

=====

En la 15-a de decembro estis grava tago por esperantistoj, ĉar ĝi estis la naskiĝtago de Zamenhof, la kreinto/ iniciatinto de la lingvo *Esperanto*. Ni okazigis prelegojn pri Esperanto por venigi interesantojn aŭskulti kio estas Esperanto laŭ diversaj aspektoj. Ekzemple lingva, turisma, politika kaj religia. Entute estis 19 ĉeestintoj en la festo, por ni estis la plej granda aranĝo por prezenti Esperanton al interesantoj. La festo komenciĝis pere de satulmesaĝoj de Renato Corsetti, eksa prezidanto de UEA kaj sekvis la salutmesaĝo de prof. SO Jinsu, la prezidanto de KAEM.

Poste estis prelegoj, kiuj estis nur en la taja lingvo, ĉar ni celis nur por tajlandanoj. Kaj ni volas diri, ke dank' al Duolingo iuj studentoj jam eklernis Esperanton. Jen kelkaj fotoj dum la festo.



S-ro Ĵaz bonvenigis ĉeestantojn.




S-ro Warut montris la grandan vortaron PIV!




S-ro Tony kaj s-ro Ĵaz prelegis pri historio de Esperanto.



S-ro Cristian el Ĉilio prelegis pri Esperanto laŭ lingva aspekto.



S-ino Non prelegis pri Esperanto kaj politiko.



S-ro Mark (aŭstralia esperantisto loĝanta en Tajlando, kaj tradukinto de *Esperanto per rekta metodo* por tajlingva eldono) prelegis pri Esperanto kaj Bahaismo.



Jen la komuna foto.

Poste tio oni decidis organizi studrondon en januaro, ĉar kelkaj interesantoj volis eklerni Esperanton, en kiu gvidos s-ro Ĵaz.

=====

Esperantisto al Bangkoko!

=====

En tiu ĉi monato venis esperantsitoj el la urbo Gordon, samtempe kun esperantistino el Irlando. Nia amiko Ĵaz, kiu loĝas proksime de Bangkoko havis ŝancon renkontiĝi kun ili.



Poste venis korea esperantisto loĝanta en Aŭstralio. Nia amiko Ĵaz ankoraŭfoje havis la ŝancon renkontiĝi kun ŝi.

===



Fotita en la Granda Palaco, Bangkoko.

===

Poste venis s-ro Sasaki, japana esperantisto kaj eksa profesoro en la universitato Zaozhuang, Ĉinio.
Nia amiko Warut havis ŝancon renkontiĝi kun li.



=====

ขอเชิญทดลองใช้พจนานุกรมเอสเปรันโต-ไทยออนไลน์ ฉบับผู้เริ่มเรียน

<https://valso-eo.github.io/vortareto/>

สามารถใช้ออฟไลน์ได้

หากมีข้อเสนอแนะโปรดส่งมาที่นายวรุตผ่านทางไลน์นะครับ

=====

Lernada Angulo

มุมเรียนภาษา

=====

เราจะใช้ KUN, PER และ PRI เมื่อไหร่กันนะ

KUN บ่งชี้ถึงการรวมอยู่ด้วย การมาด้วยกัน ไม่แยกกัน ซึ่งตรงกับในภาษาไทยว่า “กับ”

PER บ่งชี้ถึงบางอย่างที่เป็นสิ่งช่วย อุปกรณ์หรือเครื่องมือ ที่ช่วยให้สิ่งนั้นเกิดขึ้นโดยที่ไม่ใช่จากบุคคล ซึ่งตรงกับในภาษาไทยว่า “โดย, ด้วย”

PRI บ่งชี้ถึงหัวข้อหรือบางสิ่งๆที่การกระทำนั้นมีส่วนเกี่ยวข้อง ซึ่งในภาษาไทยจะตรงกับคำว่า “เกี่ยว กับ”

ตัวอย่าง

Dividi biciklon kun sia najbaro. - แบ่งจักรยานให้กับเพื่อนบ้านของตนเอง

Dudek dividite per kvar egalas kvin. - Dudek dividite per kvar egalas kvin.

Pri tio mi ne volas disputi. - ผมไม่อยากจะเถียงกับเรื่องนั้น

Pli bone ne disputi kun li pri tio. - ดีกว่า(ถ้า)ไม่ไปโต้เถียงเรื่องนั้นกับเขา

Oni vivas ne kun mono, sed kun persono. - คนเราไม่ได้มีชีวิตอยู่กับเงิน แต่อยู่กับคน

Per mono ne ĉion eblas aĉeti. - (เรา)ไม่สามารถซื้อทุกอย่างด้วยเงิน

Ŝi kun sia edzo veturis per trajno. - เธอกับสามีของเธอเดินทางด้วยรถไฟ

Li parolis kun sia amikino pri Esperanto per telefono - เขาพูดกับแฟนของเขาเกี่ยวกับภาษาเอสเปรันโตด้วย(ผ่านทาง)โทรศัพท์

=====

Alvoko

=====

Vi povas kontribui vian artikoleton pri ĉio por nia bulteno!

Ĉiaj temoj estas bonvenaj,

ĉu pri via vivo, amiko, intereso, Esperanto-kunveno, ĉio estas bonaj!

Sendu vian artikoleton al [tiu ĉi ligilo](#).

Ni atendas vin!

ขอเชิญพี่ ๆ น้อง ๆ มาเขียนบทความสั้น ๆ ลงวารสารของเราครับ โดยเขียนในแนวทางของ [นิตยสาร Kontakto](#)
สามารถส่งมาได้ที่ [คลิก](#)

=====

Vi povas kopii aŭ traduki ĉiujn artikolojn en la bulteno **Verda Elefanto**, se vi mencias ligilon de la paĝo.

=====